## 一九七一年 復刻版付記

### 革命の歌（改訂）

ああ革命は近づけり、ああ革命は近づけり。
起てよ、働く人々よ、目ざめよ兄弟姉妹たち。
見よ、わが自由の楽園を、じゅうりんしたるは何者ぞ。
見よ、わが正義と人道を壊廃したるは何やつぞ。
支配と搾取、迫害に、われらいつまで屈せんや。わが脈々の熱血はあくまで自由を要求す。
われらに自由なからずば、むしろ墳墓を選ばんと、わが同胞は万国に、闘争しつつあらざるか。
春らんまんの花さえも、権力者どものために咲き、秋れいろうの月さえも、資本家地主のために照る。
わが同胞は戦争に、やつらのために殺されき。老いたる人はいたましく、やつらのために死に去りぬ、若き人らの青春もやつらのために奪われる。
ああ長年のこの怨み、いかで報いで止むべきや。われらは少く弱けれど、自由連合の力あり。
ああ起て、君よ、革命は、われらの前に近づきぬ。農夫はスキ・クワ取って起て、工夫はツルハシ取って起て。木こりはオノを取って起て。
女工はオサを取って起て、学徒は筆を取って起て、森も林も武装せよ。石は何ゆえ飛ばざるか。マイトは何を爆破する。
われらの熱血くだっては、やがて染めなす黒色旗、高くかかげて決起せよ。
ああ革命は近づけり、ああ革命は近づけり。
起てよ、働く人々よ、目ざめよ兄弟姉妹たち。

## 黒色戦線社発行パンフレット（送料は当社負担）

八太舟三著
純正無政府主義　一五〇円
階級闘争説の誤謬　一三〇円
無政府共産主義—人類解放の道—　七〇〇円

マラテスタ著
無政府主義組織論　一〇〇円
選挙戦に際して —付略伝—　一五〇円
農民の中へ　二〇〇円

石川三四郎著
マフノの農民運動　一五〇円

ベルテロー著／山鹿泰治訳
平民の鐘 —無政府の福音—　一五〇円

岩佐作太郎著
無政府主義者はこう答える　一五〇円

石川三四郎ほか三氏著
日本無政府主義運動史　三五〇円

朴烈ほか十一氏著
反逆者の牢獄手記　二〇〇円

和田久太郎著
獄窓から　八〇〇円

古田大次郎著
死刑囚の思い出　七〇〇円

天皇制破壊の渦動
—一・二皇居発煙事件訴訟記録—
埴谷雄高氏の天皇制批判の証言収載　三〇〇円

（近刊）
倫理学 —その起源と発達— クロポトキン著
付　無政府主義の道徳　八太舟三訳

取扱書店
東京・神田ウニタ・吉祥寺ウニタ・早稲田・文献堂・谷書房・新宿・模索舎・紀伊国屋書店◎川崎・甘露書房◎横浜・ルビコン書房◎名古屋・書店ウニタ◎大阪・ウニタ書店・曽根崎書店◎京都・三月書房・ふたば書房・京都書院◎神戸・イカロス書房◎北九州・未来書房◎札幌・アテネ書房◎仙台・八重州書房◎前橋・煥乎堂・大成堂◎伊勢崎・三光堂◎自由連合社◎リベルテール社

# Biografio de Sakae Osugi

## MARTIRO DE ANARĤIISTA MOVADO EN JAPANUJO

1885 :—La 17-an de Januaro li estis naskita en urbo Marugame; lia patro estis subleŭtenanto Azuma Osugi, patrino Tojo. Lia avo estis vilaĝestro en Aiĉiken, kie estis naskita lia patro. Post lia naskiĝo lia patro estis transpostenigita al Tokio Imperiogarda Divizio kaj la familio transloĝis en Tokio.

1889 : (5 jr.) Lia patro estis transpostenigita al Ŝibata Regimento en Provinco Eĉigo, do li tien vivadis ĝis 15 jr, dume li estis precipe influita de la temperamento de la patrino, kiu estis kuraĝagema do li en la primara lernejo ĉiam estis tre diligenta kaj eminenta, sed tre malgracia kaj petolema. Li fervore ekzercis skermadon kaj luktadon.

1899 : (15 jr.) Li eniris en Nagoja Milita Prepara Lernejo kaj post 2 jr. 6 monatojn estis folasigita de la lernejo, la kaŭzo estis pro viradulto tamen ankaŭ oftaj senordigo kaj kontraŭsuperuloj estis ĉefaj kaŭzoj.

1902 : (18 jr.) Li venis al Tokio kaj eniris en Ĵuntendo Liceo kaj diligentis por plunumi sian lernon en franca lingvo kaj la ambicio en la milita servado, sed meze de la ekzameno lia patrino mortis, do li tre konfuziĝis kaj superstiĉiĝis en kristanismo kaj estis baptita.

De tiam li interesiĝis en libroj „Nova Socio“ traduko de R. Jano, kaj „Darvinismo“ de Prof. A. Oka.

1903 : (19 jr.) Li gradiĝis la liceon. Vintron de tiu ĉi jaro en tag-ĵurnalo „Manĉo“ la redaktoroj malpaciĝis, kaj persistintoj de antimilitarismo D. Kotoku, T. Sakai, S. Iŝikaŭa kaj ceretaj foriris kaj fondis „Hejmin-Ŝa“ (Proletaria Societo)

kaj eldonadis semajnan revuon „Hejmin Ŝimbun“ kaj li tre interesiĝis tion kaj ĉiam vizitis la societon. Dume li ŝatante legadis verkon de D. Kotoku „Esenco de Socialismo.“

1904: (20 jr.) Li ĉeestis kursokunvenon de Hejmin-Ŝa kaj sekve tute emancipiĝis sian penson de la veneno de religio, kaj helpadis servojn de redakcio tradukante francajn socialismajn revuojn.

1905: (21 jr.) Januaron, Semajna Hejmin-Ŝimbun ĉesis eldonadi kaj de Februaron ekeldonis revuon „Ĉokugen“ (Justa Diro) kaj Septembron ĉesis; Oktobron disiĝis Hejmin-Ŝa pro membroj dividiĝis en du, unuj kristanismaj socialistoj eldonis revuon „Ŝin Sei Ki“ (Nova tempo), kaj antireligiaj eldonis revuon „Hikari“ (Lumo), kompreneble li aniĝis al Hikari.

1906: (22 jr.) Li gradiĝis Fremda Lingvo-Lernejon kaj unu tagon li iris sur straton por serĉi sian situacion ĝus tiam li vidis tumultan popolamason por kontraŭi karigon de trampago, kaj li tuje enĵetis si mem en la popoloj kaj kuraĝe batalis kun policanoj sed fine estis arestita kaj procedurita je 2 jr. 6 monatojn da malliberigo. La junion estis kaŭcie elkarcerigita. Aŭguston li kunviviĝis kun socialistino Jasu Hori, kiu estas fratino de edzino de solialisto T. Sakai. Novembron sur la revuo Hikari 21a numero aperis lia traduko de antimilitarismo kiu aperis sur franca revuo „L'Anarchie“ „Al Novaj Soldatoj“ kaj tio ankaŭ estis procedurita. En tiu ĉi jaro estis fondita Japana Esperantista Asocio kaj li ankaŭ estis unu el tiuj ĉi fruaj esperantistoj.

1907: (23 jr.) Januaron fondiĝis socialista tagĵurnalo „Nikkan Hejmin Ŝimbun“ kaj Februaron li publikigis sur la ĵurnalo lian tezon „Tendenco de Socia Movodo en Eŭropo“ kaj per ĝi deklaraciis sian anarĥiisman opinion. Aprilon li estis remalliberigita 5 monatojn por la procedurita afero de la traduko de „Al Novaj Soldatoj“ kaj poste aldonita plu 3 monatojn por la traduko de „Alvoko al Junuloj“ de P. Kropotokin, kiu aperis sur la Hejmin Ŝimbun post li estis



malliberigita. La 14an de Aprilo Nikkan Hejmin Ŝimbun estis perforte ĉesigita eldonadon de regantaro, do en urbo Osaka estis daŭrigita ŝanĝiginte la titolon al „Nippon Hejmin Ŝimbun“ (Japana Proletaria Ĵurnalo). Li estis liberigita Novembron,

1908: (24 jr.) Januaron ĉe la propaganda kurso de „Vendreda Societo“ la kunveno estis perforte disigita de aŭtoritataĉo, tiam li suriris sur tegmento de la kunvenejo kaj paroladis turnante al popolamaso sur la strato, kaj post severa luktado kun policanoj fine li estis arestkaptita kaj enkarcerigita 40 tagojn. Junion unu socialisto eliris de malliberejo kaj estis aranĝita bonvena kunveno, okaze de tio la kontraŭaŭtoritatistoj intencis deklari sian opinion kaj decideme kontraŭstari al socialistoj, ĉe la kunveno li persiste diskutis kun dekstraj socialistoj T. Sakai kaj ceteraj, post la kunveno disigita de policanoj li kaj 14 geanarĥiistoj demonstraciis sur stratoj Kanda, kunportante du ruĝajn flagojn kun japanaj literoj „Anarĥio“ kaj „Komuno,“ sed baldaŭ atakis policanoj sur ili kaj ĉiuj kamaradoj estis forarestitaj kaj li estis enkarcerigita 2 jr. 6 monatojn. Post tiam Japana socia movado apartiĝis du fluojn nome anarĥisma kaj socialisma, kaj tiun ĉi aferon oni nomis „Ruĝflaga afero.“

1909: (25 jr.) Li pasigis tutan jaron en malliberejo en Ĉiba.

1910: (26 jr.) Februaron mortis lia patro. Novembron li eligitis de la karcero kaj aniĝis en Baibunŝa (Komerca Literaturo-Societo) kiu estis administracita de T. Sakai. Dum li estis en malliberejo okazis la afero de kontraŭ imperiestra ribelo kaj anarĥiisto D. Kotoku kaj 23 gekamaradoj estis arestitaj.

1911: (27 jr.) La 24an de Januaro estis pendmortigitaj D. Kotoku kaj 11 martiroj de la kruela japana regantaro kaj ceteraj 12 kamaradoj estis malliberigitaj por tutaj vivoj. Do la japana socia movado eniris la plej malluman epokon. Ĉiuj libroj kaj gazetoj revoluciemaj tute estis malpermesitaj eldoni kaj regantaro ekstreme furioze subpremis diskutadon.

Antaŭ ol ili estis mortigitaj li ofte vizitis D. Kotoku kaj ceterajn ĉe la malliberejo kaj li estis profunde impresigita kaj konsciiĝis ke li pliforte staros sur sia principo kaj kulturi tiun ĉi mizeran epokon, ĉar preskaŭ tute da kamaradoj diskuris rifuĝante furiozan arestadon de la polico.

1912: (28 jr.) Post paciencego dum unu jaro, Oktobron li kaj K. Arahata (li bolŝevistiĝis lasta tempe) komencis eldonadi monatan revuon „Kindai Ŝiso" (Moderna Penso) kaj kaŝeme propagandis anarĥiismon inter junuloj en abstraktaj diskutoj pri sociologio kaj filozofio, kaj malfermis militon sur principo en literatura socio.

1913: (29 jr.) Li jam estis estimata kiel la lumo en pensula socio. De Februaro li ĉesis kunvenon, kaj Julion komencis kurson „Sindikalisma Societo," sed la laboristaro ankoraŭ tute ne konsciiĝis kaj kunvenantoj precipe estis literaturaj junuloj.

1914: (30 jr.) La revuo Moderna Penso pli kaj pli sopraniĝis diskutan tonon, kaj sekve jam li ne kontentis daŭrigi ĉi tian inteligentulecan eldonaĵon kaj denove komencis eldonadi monatan gazeton por laboristoj „Hejmin Ŝimbun" (Proletaria ĵurnalo) kaj plej konkrete propagandadis; numeroj 1, 2, 3, daŭrige malpermesita disdoni de la regantaraĉo. La Sindikalisma Societo tiam ŝanĝis nomon „Hejmin Koenkai" (Proletaria Kurso). Tiam jam kolektiĝis ĉirkaŭ li multaj kamaradoj novaj kaj malnovaj.

1915: (31 jr.) Hejmin Ŝimbun numeroj 5, kaj 6 ankaŭ estis perforte malpermesitaj kaj forkonfiskitaj tute, presantajn ĉe presejo. Oktobro reeldonis la revuon Moderna Penso.

1916: (32 jr.) Januaron ĉesis eldonadi la revuon kaj la Proletaria Kurso ankaŭ ĉiufoje kaŝeme ŝanĝis la kunvenojn pro persekutema mallhelpo de polico. Tiam li apartiĝis kun ĝis tiama amatino Jasuko Hori, kaj forlasigis unu amatinon Iĉi Kamiĉika el du novaj, kaj kunvivis kun la lasta Noe Ito, do Iĉi Kamiĉika lin vundigis per ponardo de envia malamo, kaj tiu ĉi afero tre famiĝis en socio, kaj la multaj kamaradoj foriris de li.

1917: (33 jr.) Li kunvivis kun Noe Ito, kiu estis literaturistino



kaj Ĉefredaktoro de revuo „Seito" (Bluaj Ŝtrumpoj), kaj naskis unuan infaninon li ŝin nomis „Mako" (Satanino). Decembron ili eldonis revuon „Bunmei Hihjo" (Civilizacia Tritiko) malgraŭ li estis en plej malriĉa vivado.

1918: (34 jr.) Januaron li transloĝiĝis en la malriĉula domaĉaro en orienta kvartalo de Tokio. La revuo ĉesis en la 3a numero. Kaj li nove komencis eldoni monatan gazeton „Rodo Ŝimbun" (Laborista Ĵurnalo) kun kunhelpantoj Kdo. K. Ŭada kaj U. Hisaita, kaj samtempe malfermis kunsidon pri laborista problemo. Julion la gazeto ĉesis eldonadi en numero 4-a.

1919: (35 jr.) De printempo la movado de laborligoj tre prosperis ekscitite de okazoj, rusa revolucio, tutamonda ekonomia paniko, riztumulto en Japanujo, internacia laborista konferenco. Do tiel nomita „Osugi Partio" plej ageme movadis por forpeli kondukantojn de laborista movado, kaj dekovri la intrigojn de makleristoj kaj perfidantoj en strikoj. Tiam kamaradoj fondis unu grupon „Hokufu Kai" kaj ofte kunvenis por konsili pri stabo de ĉi tia batalado. Hazarde lia loĝejo fajris, sed de Oktobro li kaj K-doj K. Kondo, U. Hisaita, K. Ŭada, kaj K. Nakamura, komencis eldonadi unu propagandan gazeton „Rodo Undo" (Laborista Movado), celante akceligi liberan federacian tendencon inter antiaŭtoritatemaj laborligoj. Decembron li estis punita 3 monatojn de enkarcerigo por li vundigis unu spionon. Tiam naskiĝis dua filino „Saĉi."

1920: (36 jr.) Marton li estis liberigita. Julion gazeto Rodo Undo ĉesis eldoni, kaj li transloĝis en Kamakura. Aŭguston estis organizita unu ĝenerala organo „Ŝakaiŝugi Domei" (Socialista Alianco) kaj li estis unu el la organizatoroj, kaj baldaŭ li iris al Ŝanhai Ĥinujo por organizi internacian konfederacion de revoluciemaj grupoj en Rusujo, Ĥinujo, kaj Japanujo kaj konsilis kun rusaj kaj ĥinaj bolŝevistoj sed ne atingis kontentan rezultaton ĉar li persistis japana revolucia movado devas esti akceptebla la helpon de Rusujo tute senkondiĉe kaj senkomande ĉar

rusoj ne scias pli bone pri japana cirkonstanco, do ili maldevas trudi krom liveri klopodigiloj. Li restadis tien dum unu monato sed vane revenis.

1921 : (37 jr.) Januaron nove alhelpiĝis K. Ii kaj S. Takacu kun antaŭaj membroj ekeldonis semajnan revuon sub sama titolo kun antaŭa „Rodo Undo." Februaron li malsaniĝis tifso kaj enhospitaliĝis, kaj iam estis tute danĝera sed Marton resaniĝis.

Dume la novenvenintoj du rilatiĝis kun bolŝevistoj kaj perfidis anarĥiistan movadon, do la semajna Rcdo Undo Ĉesis kaj la perfidintoj Takacu kaj Ii estis forpelitaj. Tiam naskiĝis 3a filino Emma.

1922 : (38 jr.) Januaron komencis eldonadi denove monatan „Rodo Undo" la trian fojan kun K-ino Noe Ito, K. Kondo, kaj K. Uada kaj li kvarope, sur tute anarĥiisma diskuto, kaj nete opiniadis kontraŭ-centralizan ideon, kaj liberan federacion inter laborligoj. Majon naskiĝis 4a filino Louis. Oktobron en urbo Osaka estis malfermita kongreson de laborligoj en tuta Japanujo por organizi ĝeneralan konfederacion. Sed unuj kiuj bazas sur kontraŭaŭtoritato opiniis liberan federacion kaj aliaj persistis organizi unu grandan unuiĝon bazante sur centralizo, do la kongreso malpaciĝinte disiris. Ĵus tiam li ricevis invitan leteron de K-do. A. Colomer en Parizo ke li ĉeestu ĉe la Internacia Anarĥiista Kongreso en Berlino, do li rapide preparis kaj kaŝeme foriris de Japanujon kaj en Ĥinujo li intervidiĝis kun ĥinaj kamaradoj kaj de ilia helpo li gajnis pasporton kiel unu ĥina studento, kiu iras al Francujo kaj estis komisita ĥinan proponon al la kongreso.

1923 : (39 jr.) Januaron li enŝipiĝis de Ŝanhajo en franca ŝipo „Andre le Bon" kaj surteriĝis al Marseille. Februaron li vizitis Ljon kaj Parizon kaj restadis ĉirkau unu monato dume intervidiĝis kun multaj Europaj gekamaradoj kaj la unuan de Majo li ĉeestis la demonstracian paradon de laboristoj en Parizo kaj paroladis al ili agitan temon kaj la 2an li estis arestita kaj ekzeligita de franca regantaro, kaj plie la kongreso estis prokrastigita do li revenis Japanujon en Julio. Aŭguston naskiĝis 1a filo kaj li nomis „Nestor", devene ke dum li restadis en Eŭropo li plej interesiĝis pri la movado de anarĥiista marŝalo Nestor Maĥno, kaj li kolektis sufiĉan materialon pri tio 1an de Septembro en Tokio kaj Jokohama okazis forta tertremado kaj granda fajrego kaj pro tio Japana Regantaro freneze furioziĝis kaj kruele buĉadis multenombre da koreojn, ĥinojn, kaj revoluciemulojn pretekstante ke ili bruligas domojn. Sekve li kaj Noe Ito kaj lia kuzeto Munekazu Taĉibana (Usona urbano en Portland) triope estis kaptita de sangavidaj ĝendarmoj M. Amakasu kaj aliaj, kaj sekrete sufokmortigitaj de ili, la 16an de Septembro en la ĝendarmkomandejo apud imperiestra palaco, kaj la tri kadavroj tute forŝtelitaj vestaĵojn kaj enĵetitaj en la puto, kun ŝlimo, la ĝendarmaĉoj tiel timeme penis kaŝigi sian krimon, sed de enketado de kamaradoj la krimo estis tute malkovrigita eĉ tio estis granda intrigo de Japana Regantaro kaj estis sisteme agita sub la aprobo de la superuloj de la krimuloj.

Tiu ĉi estas skizo de historio de anarĥiisto Sakae Osugi.

Fine ni, liaj kamaradoj aldonas unu linion :

„Sangon lavu per sango!"

Tradukis T. Jamaga.

# BIBLIOGRAFIO DE OSUGI

**Universala Parencaro,** 1907.
Tradukita de „Universal Kinship" de, H. Moore, la 4a vol „de" Biblioteko de Ploretaria Scienco," kiu estis komplikita de T. Sakai. Li tradukis ĝin en Sugamo malliberejo, kiam li estis 22 jaraĝo.

**Batalado je Vivo** Okt., 1914.
Lia unua tezaro, kolektita el la revuoj „Moderna Penso" kaj aliaj.

**Neado de Principlo de Materio-Konservado,** Okt., 1914.
Vol 1 de „Biblioteko de La Plej Lasta Scio," traduko de „Naissance et l' Evanouissement de la Matière „kaj" L' Evolution de la Matière Livre I, Les Idées Nouvelles sur la Matière" de Gustav Le Bon, Psikologisto.

**Socia Individualismo,** Nov., 1915.
Kolekto de liaj tezoj dum unu jaro, post eldono de „Batalado je Vivo."

**Filozofio de Laborista Movado,** Marto, 1919.
Vol. 4 de „Biblioteko Vivado kaj Arto," kolekto de liaj tezoj pri laborista movado, precipe pri Sindikalismo, sed tuj post kiam estis eldonita baldaŭ malpermesita disdoni de regantaraĉo.

**Origino de Specoj,** Marto, 1916.
Traduko de "The Origin of Species" de Charles Darwin.

**Evolucio de Geseksa Rilato,** Feb., 1917.
Traduko de „L'Evolution du Mariage et de la Famillie" de Letourneur.

**Popola Arto,** Junio, 1917.
Traduko de „Le Theatre du Peuple" de Romain Rolland.

**Mutuala Helpado,** Okt., 1917.
Traduko de „Mutual Aid" de Peter Kropotkin.

**Vivado en Malliberejo,** Aŭg., 1919.
Li skribis laŭ lia memoro, lian vivadon en malliberejo, do tio ĉi estas unu parto de lia aŭtobiografio.

**Memoroj de Revoluciisto,** Feb., 1920.
Traduko de la aŭtobiografio de P. Kropotkin „Memoirs of a Revolutionist."

**Honoro de Alumozulo,** Majo, 1920.
Kolekto de mallongaj noveloj, kunlaboraĵo kun Noe Ito, enhavas lian „El la Cindro."

**Studo de Kropotkin,** Nov., 1920.
Enkonduko de la esenco de ideo de Peter Kropotkin.

**Petolo,** Marto, 1921.
Unu rekordo de lia sufera penado pro la socia movado kaj tio ĉi ŝajnas kiel unu parto de lia aŭtografio.

**Vera Formo de Homo,** Junio, 1921.
Kunigita la postan parton „Spirito Volumo" kun „Universala Parencaro" kiu estis eldonita 1907.

**La Koro Postulanta La Justecon,** Aŭg., 1921.
Lia reprezenta tezaro, kolektita el la lastaj kaj elektitaj ĉefajn el Batalado de Vivo, Socia Individualismo, kaj Filozofio de Laborista Movado kaj aldonita „Alvoko al Junuloj" de P. Kropotkin.

**Du Revoluciistoj,** Junio, 1922.
Kunlaboraĵo kun Noe Ito. Li enkondukis pri ago kaj ideo de Michael Bakounin, kaj Ito, pri vivo kaj ideo de Emma Goldman.

**Karikaturoj,** Okt., 1922.
Kiel la para volumo kun Petolo, bildoj por propagandado estas ellaboraĵo de K. Moĉizuki.

**Rememoraĵo Entomologia,** Okt., 1922.
Traduko de „Etudes sur Linstinat et les des Insectes" „Souvenirs Entomologiques" de J. H. Fabre. De jarfino en 1919 en la malliberejo li interesiĝante legadis verkojn de Fabre kaj post elkarceriĝo li estis ektradukante tion, kiu havas 10 volumojn.

**Rusa Revolucio tra Anarĥiista Vido,** Okt., 1922.
Li klarigis sian sintenadon kiel unu anarĥiisto, por la rusa revolucio. Por aldono enhavas tradukon de „Revolution dans l'Ideé Revolutionaire" de P. Kropotkin.

**Rakonto pri Natura Scienco,** Marto, 1923.
Kuntradukaĵo kun S. Jasunari, de „Le Livre d'Histoires" de Fabre.

**Mistero de Scienco,** Aŭg., 1923.
Kuntradukaĵo kun Noe Ito de „Maitre Paul" de Fabre. Supraj du libroj de Fabre estas populalaraj sciencaj kursoj.

**Mi ĉi-tiel forkuris de Japanujo,** Nov., 1923.
Riskinte trapasi ruzajn okulojn de spionoj Japanaj, li vojaĝis por ĉeesti la anarĥiistan kongreson en Berlino, survoje li essis arestita en Parizo. Aldonita artikolo pri Nestor Maĥno.

**Aŭtobiografio,** Nov., 1923.
Li estis daŭre skribante sur gazeto „Rekonstruo," kaj kolektis ĝis lia vivado en militlernejo.

**RODO UNDO ŜA**
NO. 15 KATAMACHI, HONGO, TOKIO